



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj
Provezemplero: 1 resp.

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA



XVIII KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO

La esperantistoj, kiuj partoprenis unu post la alia la diversajn Kongresojn de K. E. F. povas konstati, ke ĉiu nova Kongreso superas la antaŭajn. Nia ĵusa Kon-

greso en Manresa postlasis grandan optimismon ĉe ĉiuj partoprenintoj kaj en vero oni demandas al si, kial kelkaj esperantistoj obstinas fermi la okulojn antaŭ la kreskanta forto de nia landa organizo, kies Kongresoj tiel klare prezentas la konstantan progreson de nia enlanda movado. Nia XVIII venkis facile la diversajn barojn, kiujn starigis antaŭ ĝi la organizantoj de alia Kongreso, pri kies rezultato ni povos legi nur blufon, se oni ne havos la sincerecon konfesi, ke la katalunaj esperantistoj partoprenis nur sian Kongreson kaj ke la aliaj esperantistoj en la duoninsulo restis hejme. La leciono povus esti tre fruktodona, se ĝi sukcesus komprenigi, ke K. E. F. estas la landa asocio en Katalunujo kaj ke sen ĝia kunlaboro oni ne povas entrepreni certajn agadojn. Ni timas tamen, ke la lecio-

non oni ne lernos. Ĝi estas facila, sed ne en ĉiu kaŝo estas saĝo.

Manresa akceptis la kongresanojn kun larĝe malfermitaj brakoj. La tuta urbo rigardis kun simpatio la Kongreson, kiun oni opiniis granda honoro. La vasta propagando disvolvita de la O. K. per la gazetaro kaj precipe per la loka radiostacio estis tre efika. Ĉiuj loĝantoj komentariis la belan feston kaj ĉiuj konversacioj temis pri la alta signifo de esperanto.

Antaŭ la sidejo de «Bela Espero» la gekongresanoj kolektiĝis je la fiksita horo. Ne malpli ol 250 gesamideanoj ricevas la belan kongresinsignon, kiu konsistas el granda verda stelo el celuloido kun la blazono de la urbo kaj surskribo pri la Kongreso. Kun flagrantaj standardoj la kongresanaro sin direktas manifestacie al la Urbodomo, kie okazas la

OFICIALA AKCEPTO

La granda ĉefĉambro de la Urbodomo estas preplena kaj kelkaj esperantistoj devas resti en apudaj ĉambroj. La urbestro, Sro. Francisc Marcet, kiu havas apud si ĉe la prezido kelkajn konsilistojn, alparolas la gekongresanojn kaj esprimas sian emocion pro la granda ĉeesto de batalantoj de la lingvo internacia, kiun li ĉiam rigardis kun simpatio. Li ĝojas, ke li povas partopreni tian feston, kio estas kvazaŭ oazo en la konstanta, kelkfoje malagrabla batalo de la politiko, en kiu disvolviĝas la vivo de la gvidantoj de la urbo. Li dankas la esperantistojn, kiuj bonvolis elekti lian urbon por sia Kongreso kaj deklaras ke kiel li mem ĉiuj manresanoj estas pretaj servi la ŝatindajn honorgastojn, al kiuj li esprimas la plej koran bonvenon.

Post dankaplaŭdado de ĉiuj ĉeestantoj, Sro. S. Alberic, nia prezidanto, eldiras kelkajn vortojn de danko kaj faras skizon pri la celo de esperanto kaj pri ĝia taŭgeco en la rilatoj de diverslingvaj popoloj kaj homoj, precipe kiam temas pri humilitaj lingvoj, kiuj per esperanto povas stari fiere sur la sama ŝtupo de ĉiuj ceteraj lingvoj.

La urbestro ree dankas kaj proponinte la ĉambron por la kunvenoj de la Kongreso forlasas la salonon kun siaj konsilistoj. Post tio komenciĝas la

MALFERMA KUNSIDO

La prezidanto de K. E. F. kun la membroj de la komitato

kaj Sro. Antoni Muset, prezidanto de la O. K. sidigas ĉe la prezida tablo.

Sro. S. Alberic faras la malferman paroladon. Li komencas rememorante, ke antaŭ unu jaro ni renkontigis en unu el la plej historioplenaj urboj de nia lando kaj ke tiam ni ĝuis la plej belajn tagojn de nia esperantista vivo. Nia lastjara Kongreso en Ripoll — li diras — transiris al la paĝoj de nia historio kun la plej rimarkindaj reliefoj. Hodiaŭ ni kunvenas en ne malpli interesa kaj grava urbo kaj ĉiuj ŝajnoj antaŭvidigas novan sukceson de nia movado kaj de nia kara K. E. F. kiu en la daŭro de sia longa batalado por la lingvo internacia, tiom da belaj kaj sukcesaj entreprenoj efektivigis. Mi salutas vin plej kore kaj kun la plej granda emocio, plena de ĝojo kaj espero. Mi esprimas al vi bonvenon de samideana amikeco kaj diras al vi: Ni venis al Manresa ne por la amuzoj, kiujn tiel lerte kunmetis la O. K., la laborema esperantista grupo «Bela Espero», sed precipe ni venis al la XVIII kun la firma decido labori frukto-done por nia afero, atente pristudi niajn problemojn kaj diligente priatenti la diversajn aspektojn de nia movado. Nia Kongreso estus bedaŭrinda foruzo de niaj energioj, se la tuta tasko de niaj kunsidoj konsistus el belaj paroladoj, agrablaj amuzaj festoj kaj ekskursoj. Tiu parto de niaj kongresoj estas interesa kaj subteninda, sed ni starigu unuavicen la interesojn de nia movado kaj tio estu la kerno de nia tuta laboro.

La parolanto aludas la situacion de U. E. A. kaj priskribas la bedaŭrindan batalon inter la diversaj tendencoj. Li esprimas la esperon, ke post kelka tempo la afero estos en ordo kaj la internacia organizo funkcios normale. La prezidanto dediĉas kelkajn paragrafojn al la karmemora Kreuz, kiu havis ĉiam ĝustan koncepton pri la kataluna esperanto-movado. Aludante la tutmondan liaoson li diras: Mi ne povas diri, ĉu la krizo pezanta sur nia organizo estas trenata de tiu pli ĝenerala krizo, kiu tenas la mondon en konstanta malekvilibro kaj ĉiuj moraraj fortoj submetiĝas al la premado de materiaj postuloj, kiuj neniigas la idealojn kaj faras la homojn simplaj figuretoj de ŝakludo, dum kiu ili estas puŝataj en diversajn direktojn laŭ la postuloj de la reguloj. Sekvas analizo pri la kataluna esperanto-movado kaj studo pri la psikologio de la katalunoj kaj li el-tiras saĝajn konkludojn pravigantajn la kialon de la individualismo superreganta multajn agadojn. Li faras varman alvokon al komuna agado por eltiri la maksimuman profiton por nia afero.

La prezidanto detale priskribas la sintenadon de K. E. F.

rilate al la Kongreso de H. E. A. en Barcelona kaj la kongresanoj substrekas per aplaŭdoj kelkajn paragrafojn.

Sro. Alberic finas sian paroladon esprimante plej koran bonvenon al ĉiuj gekongresanoj kaj esperante, ke la taskoj de la Kongreso estos fruktodonaj.

La sekretario, Sro. Rafael Gisbert, legas la sekvantajn aliĝojn: Urbestroj de Barcelona, Manresa, Vic, Cardona, Martaró, Badalona, Armentera, Manlleu, Palafrugell, Sta. Coloma de Queralt, Vilafranca del Penedès, Sabadell, Granollers, Girona, Caçà de la Selva, Banyoles, Reus, Ripoll, Lleida, Roses kaj Vendrell. Societoj: «Flugiloj» el Caçà de la Selva, «Brava Marbordo», el Roses, «Esperanto-Grupo» el Ripoll, «Ateneu Polytechnicum» el Barcelona, «Ateneu Enciclopèdic Popular» el Barcelona, «Caixa d'Estalvis» el Manresa, «Cooperativa Obrera Manresana», «Foment de Turismè» el Manresa, «Orfeó de Sabadell», «Ateneu Cultural» el Caçà de la Selva, «Amics de l'Art i de les Lletres» el St. Feliu del Llobregat kaj «Ateneu de Tarragona».

Telegramoj kaj salutleteroj: Romà Amperi Rius el Sta. Coloma de Queralt, Maria kaj Enriqueta Genís el St. Antoni de Vilamajor, Joan Calahorra el Madrid, Manuel Maynar el Zaragoza, honora membro de K. E. F., J. Kuadras el Sta. Margarida de Montbuy, Jaume Argelich el Agramunt, «Grupo Laborista Esperantista» el València, Enric Aiguadè el Reus, Narcís Bofill el Palma de Mallorca, Elinjo Pähn el Tartu (Estonio), «Literatura Mondo» el Budapeŝto, Louise Briggs el West Lea (Anglujo), Steiner en la nomo de «Aŭstria Esperanto-Asocio» kaj loka Kongresa Komitato por la 28-a Universala Kongreso de Esperanto en Wien, Emma L. Osmond el Ealing (Britujo), Cecil C. Goldsmith, direktoro de «U. E. A.» kaj Pierre Petit, konstanta sekretario de «Société Française pour la Propagation de l'Espéranto».

La kongresanoj dankas kun entuziasmo ĉiujn aliĝintojn kaj ĉiujn afablajn salutintojn.

La sekretario klarigas, ke nun li legos la aliĝojn de tiuj societoj kaj instancoj, kiuj sendis reprezentanton al la Kongreso kaj li petas ĉiun reprezentanton veni sur la podion por diri kelkajn ĝentilajn vortojn al la gekongresanoj. Tion faras la sekvantaj: Eduard Capdevila el «Barcelona Stelo» (Barcelona); Joan Oliveres el «Enciklopedia Akademio Espero» (Barcelona); Josep Andreví el «Cooperativa Obrera Manresa» (Manresa); Pere Estanet el «Juneco Liberpensula» (Monistrol); Joaquim Vilà el «Girona Espero» (Girona); Tomàs

Unanue el «Paco kaj Amo» (Barcelona); Joaquim Hutesa el «Aplec Esperanta Grupo» (Sabadell); Ramon Corominas el «Esperantista Junularo» (Terrassa); Josep Pratdesaba en la nomo de la Urbestraro de Vic; Jacint Casademunt el «Universala Frateco» (Barcelona); Sebastià Chaler el «Lumon» (Terrassa); Joan Aulina en la nomo de la Urbestraro kaj esperantistoj de Banyoles; Jacint Comella el «Esperanta Grupo» (Vic); Josep Banet el «Nova Sento» (Barcelona); Jacint Figueras el «Ràdio Club Terrassa»; Antoni Martí el Orfeo de Sabadell; Francesc Guitart kaj Salvador Esvertit el «Frateco» (Vendrell); Jaume Grau Casas, en la nomo de la Lingva Komitato kaj Anna Galeazzi, en la nomo de la eksterlandaj esperantistoj.

La Prezidanto esprimas sian miron, ke la Honora Prezidanto de la Kongreso Sro. Ventura Gassol, Konsilisto de Kulturo de nia registaro, kiu ankoraŭ antaŭ du tagoj promesis sendi reprezentanton al la Malferma Kunsido kaj sian ĉeeston en la Ferma Kunsido, ne bonvolis havigi al la Kongreso la altan reliefon de sia ĉeesto aŭ reprezentanto. Li proponas, ke per telegramo la Kongreso esprimu la esperon, ke li estos kun ni morgaŭ ĉe la Ferma Kunsido.

Post aprobo la prezidanto legas la programon de la hodiaŭa tago, rekomendas akuratecon kaj fermas la kunsidon je la 11,30.

VIZITO AL LA ARKIVO KAJ MUZEO DE LA URBO

Ĉe la eliro el la ĉambro ĉiu kongresano ricevas riĉe ilustritan ekzempleron de «Revista Ilustrada Jorba», kiu enhavas bonvenajn vortojn en esperanto kaj diversajn artikolojn pri la vivo de la majstro, pri la historio de esperanto, pri la esperantista movado en Manresa, k. t. p. Ni plej kore dankas la direkcion de Magazenoj Jorba pro la ĝentila donaco kaj pro la propagando, kiun ĝi bonvolis fari per tiel disvastigita revuo.

En la urbodomo mem troviĝas la Arkivo kaj Muzeo de la Urbo. Sro. Balet gvidas la vizitantojn kaj havigas al ili tre interesajn informojn pri diversaj tre valoraj dokumentoj kaj objektoj, kiujn la urbo tie gardas kun granda amo.

MALFERMO DE LA EKSPOZICIOJ

Tagmeze la kongresanaro kolektiĝas antaŭ la tre bela moderna lernejo «Renaixença» sur kies fasado pendas granda afi-

ŝo kun surskribo «Kongresejo». En unu el la multaj ĉambroj de la lernejo estas instalita bela esperanto-ekspozicio kun abunda materialo kaj apud ĝi la ekspozicio de akvareloj de nia pioniro Jacint Comella el Vic, kies arto altiras ĉies atenton kaj laŭdojn. En la sama ĉambro Iberia Esperanto-Servo instalas riĉan standon kun multaj libroj por disvendo. Dum la malfermo, en kiu partoprenis la urbestro kaj kelkaj konsilistoj, oni disdonis al la kongresanoj interesan Kongreslibron 112 paĝan kun belaj ilustraĵoj, detaloj pri la plej rimarkindaj monumentoj de la kongresurbo kaj informoj pri loka movado kaj pri la kataluna esperantista organizo.

EKZAMENOJ

Posttagmeze, je la 3,30, malfermiĝis la ekzamenoj kaj oni aljuĝis la diplomon Atesto pri Lernado al Sro. Francesc Casanoves kaj al f-ino Manuela Pons. La tribunalo konsistis el profesoroj Delfí Dalmau, Jaume Grau Casas kaj Marian Solà.

UNUA LABORA KUNSIDO

En la Lerneja Grupo «Renaixença» de Manresa, la 31-an de majo 1936, je la 16-a. Prezidas Sro. Sebastià Alberic kaj protokolas Sro. Rafael Gisbert. Ĉeestas 118 gekongresanoj.

Sro. Alberic klarigas, ke hodiaŭ matene oni ricevis telegramon adresitan al Sro. Pujulà sed tial ke Sro. Pujulà alvenis post la Malferma Kunsido nur post ĝi ni povis sciigi pri ĝia enhavo, kiu tekstas: «Mi petas reprezentu min ĉe la Malferma Kunsido Esperanto-Kongreso kun entuziasma aliĝo. Ventura Gassol.» Sro. Alberic invitas Sron. Pujulà kiel oficialan reprezentanton de la Konsilisto de Kulturo okupi honoran lokon ĉe la prezida tablo. La kongresanoj stariĝas kaj dediĉas varman aplaŭdon al la reprezentanto de Sro. Gassol.

La sekretario legas la protokolon pri la lasta ĝenerala kunsido ordinara kaj la kasisto, Sro. Josep M. Coll, tiun pri la financoj. Ambaŭ raportojn oni aprobas.

Sro. Rafael Gisbert legas la Jaran Raporton al la Kongreso. Resumon pri ĝi ni donas:

Denove mi havas la honoron legi al vi la Jaran Raporton pri nia Federacio, informante vin pri la tasko disvolvita de la Komitato; tasko, kiun ni konsideras tre modesta, ĉar multo por fari estas ankoraŭ en nia movado. Ni nur deziras, ke nia labo-

ro estu al vi kontentiga, ĉar, kiel ni diris en la lasta raporto, ni nur estas viaj mandatplenumantoj.

Propagando. Al tiu ĉi gravega aspekto de nia movado ni dediĉis ĉiujn eblecojn niajn. Ĉefe ni nin okupis pri la organizo de nia Delegitaro, efika bazo de multfronta disvolvo. Ni havas nuntempe Delegitojn en la jenaj lokoj, el kies kunlaboro multe ni esperas: Reus, Vilafranca del Penadès, Girona, Manresa, Sta. Coloma de Farners, Terrassa, Vendrell, Vic, Ripoll, Sabadell, Sta. Coloma de Queralt, Vilassar de Mar, Banyoles, Tarragona, Manlleu, Agramunt, Roses, Sta. Margarida de Montbui, Puigcerdà, St. Antoni de Vilamajor kaj St. Quintí de Mediona.

La propagando per radio meritis grandan atenton nian. Al «Ràdio Barcelona» ni proponis organizi dissendon pri turisma propagando aŭ pri sciigoj el nia lando. Ni atendas respondon. Konsenton partopreni «La mitja hora de l'estudiant» de «Ràdio Barcelona» ni atingis, dank' al la kunlaboro de nia kunsocietano Sro. Esparza. Ni deziras profiti la cirkonstancon, ke nia plorata Majstro estis studento, kiam nian belan lingvon li kreis, kaj fari radian paroladon, celantan altiri la atenton de pluaj studentoj al nia movado. Pri la Kongreso ni faris kvar paroladojn per «Ràdio Barcelona», unu per «Ràdio Asociación», kaj sendis paroladojn al aliaj radio-stacioj katalunaj.

La okazon de la Kongreso ni profitis por fari grandan propagandon ĉiufanken. Krom la menciita per radio, ni skribis leterojn al ĉiuj kultur- kaj sportsocietoj el Katalunujo, invitante ilin aliĝi al la Kongreso. Al la plej gravaj el ili ni sendis kongresafiŝojn por esti fiksataj ĉe iliaj ejoj. Ankaŭ ni skribis al la plej gravaj Urbestroj el nia lando, petante premiojn por la Internaciaj Floraj Ludoj kaj aliĝon al la Kongreso. Aro da ili aliĝis, kaj sendis premion.

Pri la enkonduko de esperanto en mediojn bezonantajn profesie la esperantouzon ni zorgis. Kaj ni atingis organizi kurson ĉe «Ĝenerala Asocio de Asekuraj Kontoristoj», bone subvenciata, kaj gvidata de Lingvokomitato Sro. Jaume Grau Casas.

Por turisma propagando ni elektis Komitaton, kaj ni deziras, ke ĝiaj klopodoj atingu sukcesan rezultaton.

Al la esperantistaj Grupoj de Barcelona ni sugestis okazigi esperantistajn mitingojn; kaj ni proponis al ili nian kunlaboron por prizorgi la paroladojn kaj kunhelpi la organizon de la mitingoj. Bedaŭrinde, ĉi tiu propagando ne efektiviĝis pro la pasiveco de la Grupoj.

La ĵurnalaron ĉiukaze ni utiligis, okaze de organizo de kursoj, paroladoj, k. t. p. Precipe ni oftigis tiun propagandon dum la preparo de la Kongreso.

Kongresafiŝojn ni fiksigis ĉe Fervojstacioj, Poŝtpalaco en Barcelona, Palaco de «La Generalitat», Urbodomo de Barcelona, kaj ĉe vendejoj situantaj en ĉefaj lokoj de Barcelona.

Paroladojn, de ni organizitajn, faris Sroj. Paul von Prabucki, Jaume Grau Casas kaj Sebastia Alberic Jofre.

Klarigado de kursoj. — Krom la dirita ĉe Ĝenerala Asocio de Asekuraj Kontoristoj, en Barcelona, ni organizis kursojn ĉe «Institut Naturista Ferrandis», «Paco kaj Amo» kaj «Enciklopedia Akademio Espero», gviditaj de Sroj. Josep Garganta, Sebastia Alberic kaj Rafael Gisbert. Sub gvido de sinjoro Jaume Grau ni organizis leterkurson. Ni havas en preparo aliajn kursojn.

Eldona fako. — La Kataluna Ŝlosilo jam estas verkita de nia Prezidanto, Sro. Sebastia Alberic. Por Kataluna Esperantisto ni propagandis plej intense, celante varbi pluajn abonantojn, kies nombron ni plialtigis.

Membraro de K. E. F. — Lastan jaron nia Federacio havis 320 membrojn, kaj nun ĝi kalkulas 349. Prosperis, do, ankaŭ en tiu ĉi aspekto nia Federacio.

Sidejo. — «Institut Naturista Ferrandis», en kies sidejo ni estas klarigantaj kurson, havas bonan centran ejon, eĉ kun bela teatro. Ni estas pritraktantaj, okazigi ĉe la dirita sidejo de «Institut Naturista Ferrandis» niajn kunsidojn, prelegojn, festojn, k. t. p.

La Esperantistan Librofeston ni okazigis ĉe «Paco kaj Amo».

Subvencio de la Kataluna Registaro. — Ni preparis raporton subskribitan de geesperantistoj, de nia Komitato, kaj de ĵurnalistoj, verkistoj, kuracistoj, desegnistoj, oficialaj kaj privataj instruistoj, profesoroj, komercfirmoj, kaj aliaj, petante al la Kataluna Registaro subvencion kaj ĉian kunhelpon. Ĝin ni liveros al la Honora Prezidanto de la Kongreso, Sro. Konsilisto de Kulturo de la Kataluna Registaro, okaze de lia ĉeesto al nia Kongreso.

Enkonduko de Esperanto en la unuagradajn Lernejojn. — Al la Urbestro de Barcelona ni petis la enkondukon de Esperanto en la unuagradajn lernejojn, kaj proponis laŭlegajn kaj kapablajn profesorojn el nia Federacio.

Honora prezidanteco de la Kongreso. — Ni direktis miajn klopodojn atingi ke nia Kongreso estu ĉi jaron pli brila kaj



Fraüline ANNA MARIA PUIG VILAJOANA
Regino de la XVII Internaciaj Floraj Ludoj



La Reĝino kun siaj ĉarmaj korteganinoj fraŭlinoj: Maria Biadiu, Montserrat Jorba, Anna Maria Puig, Assumpció Tomàs, Maria Lluïsa Guilà; knabinoj: Núria Sallerés kaj Maria Conxa Illa



JAUME GRAU CASAS
Gajninto de la Natura Floro



Festeno sub la prezido de la ĉarmaj reĝino kaj korteganinoj

altnivela, sub la Honora Prezidanteco de la Konsistilo de Kulturo de la Kataluna Registaro. Niaj klopodoj sukcesis, kaj ni havos la honoron admiri la elokventecon kaj ĝui la simpatian de Sro. Ventura Gassol.

HEA. — Grandajn ĝenojn kaj laboron ŝargis sur niajn ŝultrojn la malaprobinda agado de la «Hispana Esperanto-Asocio», pri kio nenion plu ni diras, ĉar oportune ni poste pritraktos la aferon. Ni nur devas diri, ke la valoran tempon perditan ni estus povintaj dediĉi al pluaj fruktodonaj aferoj.

Jugantaro de la Internaciaj Floraj Ludoj. — Pezan laboron ĝi havis sur si. Specialan mencion meritas la Prezidanto, nia eminenta pioniro kaj verkisto, famkonata ĵurnalisto, Sinjoro Fred Pujulà Vallès, kaj la Sekretario, Sro. Eduard Capdevila.

Organiza Komitato de la Kongreso. — Vigle, ageme, entuziasme laboris niaj geamikoj el Manresa. Al ili ni ŝuldas la sukceson de la Kongreso kaj ĉi tiujn emociajn tagojn, kiujn ni travivas. Ili varme propagandis, ĵurnale, radie, k. t. p. Ni devas citi la gazeton de firmo «Jorba», dediĉitan al nia afero: efikega propagandilo. Nia movado ŝuldas multon al la bravaj gekunbatalantoj de la Organiza Komitato.

Niaj mortintoj. — Kun granda ĉagreno ni devas konstati la perdon de kelkaj el niaj karaj kaj entuziasmaj samideanoj, inter ili nia admirata pioniro Artur Doménec, al kiu dediĉis belan nekrologian artikolon nia kunkomitatano Sro. Eduard Capdevila. Ripozu pace niaj mortintoj.

Nia Prezidanto. — La raporton ni ne povas fini ne dediĉante la plej grandan admiresprimon al nia meritplena Prezidanto, Sro. Sebastià Alberic. Lia laborkapablo estas tiel altnivela kiel liaj meritoj. Kaj, super ĉio, lia oferemo faras lin la ideala Prezidanto. Ke li vivu multajn jarojn por la bono de Esperanto kaj de nia Federacio.

La raporto estas aprobita kaj aplaŭdita.

La sekretario legas pluajn salutojn al la Kongreso.

Sro. Sebastià Alberic prezentas la presprovojn de la «Kataluna Ŝlosilo». Pro neglektemo de la presisto ankoraŭ la «Ŝlosilo» ne estas presita.

Pri la verkado de la vortaro kataluna esperanta informas Sro. Jaume Grau. Rememorigas Sro. Sebastià Alberic, ke ĝi estas tasko efektivigota en longa tempo.

La Prezidanto informas pri la agado de la Komitato rilate al la konduto de Hispana Esperanto-Asocio. La sinteniĝo de la Komitato estas aprobita.

Sro. Rafael Gisbert proponas, ke la pedagogoj kaj lingvis-

toj de K. E. F. studu metodojn de instruado por niaj gvidantoj de kursoj, aplikeblaj laŭ la kapablo kaj preparo de tiuj ĉi, konsiderante, ke la necesa nombro da kompetentaj profesoroj mankas, kaj ke oni devas profiti ĉiujn entuziasmajn sed ofte ne bone preparitajn gvidantojn. Faras interesajn paroladojn pri la afero Sroj. Delfi Dalmau, Josep Albagés, Jaume Grau, Samuel Roca, Sebastià Chaler kaj Sebastià Alberic. Laŭ propono de Sro. Samuel Roca, oni aprobas, ke Sro. Jaume Grau, aŭtoro de la verko «Curs Complet de la llengua internacional esperanto» («Kompleta Kurso de lingvo internacia Esperanto»), kaj Sro. Delfi Dalmau, aŭtoro de la «Ilustrita Lernolibro de Esperanto por Praktika Komenca Kurso», faru prelegojn pri la apliko de siaj metodoj.

Laŭ propono de Sro. Fred. Pujulà, oni aprobas respondi telegrafe la telegramon de Sro. Konsilisto de Kulturo, dankante lin, kaj profunde bedaŭrante, ke lia neĉeesto estas pro malsano.

Fermo je 17-a h. kaj 15 m.

XVII INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Kun la jam konita tradicio kaj soleno okazis la festo de niaj floraj ludoj en la Kazino de Manresa, kies teatro estas la plej vasta kaj luksa de tiu laborema urbo.

Duonhoron antaŭ la komenco de la festo ĉiuj sidlokoj ĉe la parteroj kaj ĉefetaĝo estas jam okupitaj, kaj kiam la aŭtoritatoj kaj ĉiuj membroj de la Juĝantaro aperas sur la scenejo, la vasta teatro prezentas tre interesan aspekton. Oni vidas konatajn familiojn el Manresa okupantaj la loĝiojn kaj elstaras la multnombro de fraŭlinoj tra la tuta teatro, kun siaj belaj festvestaĵoj.

Sro. Muset, prezidanto de la organiza kongreskomitato, kiu portas la reprezentantecon de la Urbestro, stariĝas kaj diras la solenajn vortojn: *Oni komencas la feston.*

La Sekretario de la nunaj Floraj Ludoj, Sro. Eduard Capdevila, stariĝas, kaj en momentoj vere silentaj komencas sian raporton jene:

Sinjorinoj kaj sinjoroj:

Grandan emocion mi sentas en tiuj ĉi momentoj, plenplenaj de intima kontenteco pro la disradiana ĉarmo de tiu ĉi festo de Poezio kaj belo. Tute kompensita estas la peza tasko de la

Sekretario kaj ceteraj Juĝantoj antaŭ la kuraĝiga rezultato, kiu nun montriĝas.

Ni esprimu sinceran dankemon al la katalunaj pioniroj, kiuj 26 jarojn subtenas plej vigle kaj fervore nian ĉefan landan institucion KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO. Nur dank'al nia kara K. E. F. okazis 18 naciaj Kongresoj, kaj en la kadro de tiuj kunvenoj ĉiam brile kaj sukcese estis organizitaj la Internaciaj Floraj Ludoj.

Floraj Ludoj. Kia bela nomo, sinjorinoj kaj sinjoroj. Kiom altire ĝi pompas en la Alvoko, komence, en la Verdikto, poste, kaj fine ĉe la festo mem, antaŭ tiu ĉi kulturama publiko, antaŭ la respektindaj aŭtoritatuloj de tiu ĉi urbo, kaj sub la prezido de la simpatiaj kaj admirindaj fraŭlinoj, kiuj post kelkaj momentoj sidiĝos en tiu ĉi scenejo.

Parfumo-Carmo-Belo, Laboro-Intelekto-Fervoro. Jen du triptikoj, kiuj harmonie interplektiĝas en la daŭro de tiu ĉi festo. Ses vortoj, kiuj unuope kaj per si mem malmultan valoron havas, sed kunigitaj kaj enblovitaj de plej alta kaj fordona kreemo de la homo, ili starigas tiun ĉi esperantistan monumenton, jam oficialan, jam famkonatan, jam plensukcesan: la Internaciajn Florajn Ludojn.

Kaj komparu la kontraston de nia festo kun la kruda kaj senkompata vivo, kiu floras kaj disetendiĝas ekster la kvar muroj de tiu ĉi salonego. Ekstere, for de tiu ĉi konstruaĵo, kiun nun mi volas nomi templo de Poezio, tie, oni haaose kreas kaj detruas por-kaj kontraŭ la vivo. Sed en nian templon de Poezio ni delikate nur portas tiun parton de la ekstera vivo kreantan kaj plialtigantan la homan spiriton: la kulton al la parolo. Kaj tio estas en esenco nia festo. Kulto al la parolo, al la intelekto, al la homa saĝo.

Gesinjoroj: Mi pensas, ke nun estas jam la momento por ke ni malkovru la nomon de la ĉefa laŭreato en tiu ĉi festo de Poezio kaj Belo. Li estas la senlaca kataluna pioniro, la merita poeto Jaime GRAU CASAS, el Sant Quintí de Mediona.

Li elektis Reĝino de niaj Floraj Ludoj belan kaj simpatian fraŭlinon naskiĝintan en via gastama urbo. Ni estu pretaj riverenci ŝian majestecon kaj kun ĝojplena sento eldiru ŝian nomon:

Anna-Maria PUIG VILAJOANA

La publiko starigis kaj fervore aplaudas la elekton de la Reĝino de nia festo. Intertempe la ĉeflaŭreato, Sro. Grau Casas, ricevas de la manoj de la Prezidanto de la Floraj Ludoj

la belan kaj plenparfuman bukedon, kiu enhavas la Naturan Floron. La Poeto, akompanata de kelkaj membroj de la Jugantaro kaj de la aŭtoritatuloj ĉeestantaj nian feston, malsupreniras la ŝtupareton, kiu kunigas la scenejon al la partero de la teatro, kaj ili ĉiuj direktas siajn paŝojn al la *Hall* de la teatro, kie en apuda ĉambro atendas la Reĝino kun sia Ama Kortego la alvenon de la florkronita poeto kaj akompanantoj.

Post kelkaj momentoj kaj sub la agordoj de triumfa marŝo aperas ĉe la enirejo de la partero la bela Reĝino ĉe'l brako de la poeto kaj sekvata de siaj simpatiaj fraŭlinoj de la Ama Kortego. La publiko interrompas tiujn solenajn momentojn per forta aplaŭdado, kaj la tuta ama sekvantaro okupas siajn lokojn sur la scenejo; la Reĝino sian imponan tronon, la fraŭlinoj Maria-Lluïsa Guilà, Maria Viadiu, Montserrat Jorba, Assumpció Tomàs, Conxita Illa kaj Nuri Sellarès prenas sidlokon en apudaj brakseĝoj, rimarkindaj pro ilia eleganteco, kaj la Jugantaro kaj aŭtoritatuloj eksidas en siajn antaŭajn lokojn.

Post tiuj pompaj movoj, oni facile rimarkis ke kelka emocio penetris la korojn de la ĉeestantaro. El la scenejo forte disradias la tuta aranĝo. La esperantaj flagoj, tapiŝoj, kulisoj, k. t. p., ĉio donas elstarantan kadron al la bela grupo de blankestitaj fraŭlinoj prezidantaj tiun literaturan solenaĵon. Eleganta diademo delikate premas la harojn de la Reĝino, dum multekosta kolringo palpebrumas ĉe ŝia kolo kaj la bukedo kun la Natura Floro kvazaŭ duonsvene kuŝas inter ŝiaj nudaj brakoj...

Fine fariĝas silento, kaj la sekretario Sro. Capdevila, per laŭta voĉo daŭrigas la legadon de sia raporto.

ORDINARAJ TEMOJ

Originalaj tekstoj, I: Poemo Kantanta Amon.

Premio de Kataluna Esperantista Federacio.

Dek-tri amaj poemoj grupiĝis por tiu ĉi premio. Nur kvin el ili elstaris rimarkinde, sed la tasko aljuĝi la premion estis tute glata al la Jugantaro, ĉar oni premiis sendiskute kaj unuanime la Naturan Floron al la verko nro. 73, titolita Familia Poemaro. Kvar senriproĉaj kaj vere inspiritaj sonetoj, en kiuj la poeto ĉagrene, estime, ame kaj karese prikantas siajn sentojn al la patrino, fratino, edzino kaj filino, la kvar virinoj kiuj lasis profundan sulkon en la koro de nia festata poeto, Sro. Jaume GRAU CASAS, el Sant Quintí de Mediona.

La laŭreato Sro. Jaume Grau Casas, sur la scenejo, antaŭe-

niĝas kaj laŭtvoĉe deklamas siajn sonetojn, kunigitajn sub la titolo:

FAMILIA POEMARO

Devizo: «Amo ĉiuspeca».

AL MIA PATRINO

Pro via frua morto mi vin ne rememoras,
mi povas iel diri, ke mi ne konis vin;
sed tamen tute ofte mi vin funde priploras...
ĉar vi simile iam priploris ankaŭ min.

Ne estas kon', memoro, sed vin mi ne ignoras,
mi sentas en mi ion el via propra sin';
perdita lula vorto eĉ nun vibras, sonoratas,
aŭ en silenta vivo mi nur imagis ĝin.

Min vivo ne dorlotis, vi ankaŭ ĝin ne povis,
neniam miaj vortoj respondon vian trovis,
ne sentis mi karesojn patrinajn, el la kor';

sed en momento ĝoja aŭ en moment' ĉagrena,
en horo plej intima, en horo plej solena,
vivadas en mi ĉiam, patrin', via memor'.

AL MIA FRATINO

Fratino: ankaŭ niaj destinoj estas frataj;
ni same luktis kontraŭ malver' kaj hipokrit';
por ambaŭ ni la vojoj de l' viv' ne estis glataj,
vivbaroj niaj estis montaroj el granit'.

Malsano sur ni pezis en horoj senkompataj;
sentemo tro viveca kaj troa korekscit'
akcentis la ĉagrenon de l' baroj renkontataj;
la korpo—tro malforta; tro vigla—la spirit'.

Sed ne malhelpas troa pasi', tro da esprimo,
ĝi ŝprucas el la grandaj profundoj de l'animo,
el forta personeco, el vigla karakter'.

Ke la spirite etaj personoj rampu tere
en ŝajna sereneco, kviete, senkolere,
malplenaj, en silento, sen bril' kaj sen fier'.

AL MIA EDZINO

Hodiaŭ mi plej ĝoje rigardas vin, edzino,
pensante ke unue vi estis amikin',
ke poste niajn vivojn kunigis la Destino,
ke vi de mia kara idar' iĝis patrin'.

Sed ĉiam por mi restos vi kara fianĉino,
belega, juna, dolĉa ĝis komplezem' sen fin';
vi ĉiutempe estis kaj restas l' amatino:
amiko, edzo, patro kaj vir'... mi amas vin.

Pro mi suferis vi malĝojon kaj mizeron,
sed ne memoru nur doloron kaj suferon:
post malfeliĉa tago, venas feliĉa hor'.

Ni ridas dum mateno, dum posttagmezo ploras,
sed dum la tuta tago gefilojn ni adoras,
kaj nokte ĉiam restas amplena nia kor'.

AL MIA FILINO

Mi pleje amas vin, ho ĉarma filineto,
burgono nia, revo, espero kaj promes'.
—Ke vi feliĉe kresku!—flustras patrino peto.
—Ke, kun via frateto, vi ludadu sen ĉes'!

Ke malĝojo de l' vivo por vi restu sekreto!
Ke ne sufoku vin la vivo-malsukces'!
Ke de viaj gepatroj vi fariĝu portreto,
sed vi trovu ĉe l' mondo iom pli da kares'!

La gepatroj por vi ĉiam bonon deziras,
kaj, vidante vin kreski, ili sole sopiras
ke ĉe vi plensangigigu la fatala destin'.

Vi fariĝu sentimaj, eltenemaj, kuraĝaj,
eĉ en saĝaj momentoj estu iom malsaĝaj
kaj ne ĉiel klopodu imitadi vi nin.

JAUME GRAU CASAS

Longan aplaudadon meritas tiu ĉi soneta kvaroj, bele deklamita de nia konata poeto. Kiam fariĝas silento, la Sekretario daŭrigas jene sian raporton.

La unuan mencion meritis sesstrofa versaĵo titolita «La Di-

siĝo»; verko nro. 97, kies aŭtoro estas Sro. Stevan Zivanoviĉ, el Beograd, Jugoslavia.

Duan mencion oni aljuĝas al la verko nro. 22, titolita «Hurra! ŝi amas min!», bela soneto elfluinta el la plumo de sinjoro Martin Strümpfel, el Löznitz, Alemana.

Tria mencio estas aljuĝita al la verko nro. 110, titolita «Potenco de l'Amo», kaj la aŭtoro de tiu ĉi poemo en ok strofoj estas Halina Weinstein, el Varsovio, Polònia.

Kvaran mencion ricevas la verko nro. 78, titolita «Amo Ergo Sum», pro amo batanta versaĵo dank'al la plumo de la flua poeto Robert Swietoszewski, el Wyszogrod, Polònia.

Originalaj Tekstoj, II: Ama Verko en Prozo.

Premio de Kataluna Esperantista Federacio.

Ok manuskriptoj estis klasifikitaj por tiu ĉi premio. Super ĉiuj unuanime meritis la premion la verko nro. 13, titolita «Kunigitaj por ĉiam». Unu el la plej bonaj originalaĵoj ricevitaj por tiuj ĉi Floraj Ludoj, kies enhavo pravas pri vera verkista talento. La aŭtoro estas Sro. Leo Belmont, el Varsovio, Polònia.

Mencion meritas la verko nro. 98, titolita «ŝiaj Larmoj». Aŭtoro: Sro. Stevan Zivanoviĉ, el Beograd, Jugoslavia.

Tradukitaj Tekstoj.

Premio de Kataluna Esperantista Federacio al la plej korekta traduko de la kataluna versaĵo «En la Cruilla», de la aŭtoro Josep Carner.

Kvin tradukoj alvenis de la aludita versaĵo. Nediskuteble meritis la premion la verko nro. 1, devizita *Denove*, kiu en formo artisma interpretas la fundon kaj formon de la poemo. Ĝian tradukon ni ŝuldas al Sro. Jaume Grau Casas, el St. Quintí de Mediona.

En valoro sekvas la verko nro. 16, devizita «Aŭtuno», kiu meritas la unuan mencion kaj aŭtoro estas Fraŭlino Amalia Nuñez Dubús, el Pamplona.

Dua mencio estas donita al la verko nro. 16, devizita *Renkontigo*, kies aŭtoro estas nia vigla batalanto Sro. Jacint Comella, el Vic.

Premio de Kataluna Esperantista Federacio al la plej korekta traduko de la kataluna prozaĵo «Traspuament de Llum», de la aŭtoro J. Carner.

Ses katalunoj sendis tradukon de la citita rakonto kaj nur

du sukcesis ĉe la tradukado de tiu malfacila peco de Josep Carner.

La premion ricevas la verko nro. 17, devizita *Arto, scienco kaj libero*, kiu trafe transsaltis ĉiujn malfacilaĵojn kaj glate interpretas la frazturnojn de la aŭtoro. La sukcesinta tradukinto estas Sro. Delfí Dalmau Gener, el Barcelona.

Mencion meritas la verko nro. 39, devizita *Rozo Skarlata*, ne malpli merita ol la antaŭa, sed ne tiom sukcesinta en du aŭ tri momentoj de la tradukado. Ĝia aŭtoro estas Sro. Lluís Mimó Espinal, el Sabadell.

EKSTERORDINARAJ PREMIOJ

Definitaj Temoj.

«Laŭdo al la Kiso», fiksita temo de la premio VII.

Kvar manuskriptoj originale verkitaj partoprenis tiun ĉi premion.

La premion rajte atingis la verko nro. 9, devizita «Versaĵo kantanta amon», kiu en soneta formo prikantas kun ama elfluo la kison. La aŭtoro estas nia trobadoro Sro. Jaume Grau Casas, el Sant Quintí de Mediona.

Mencion oni aljuĝas al la verko nro. 63, titolita «La Kiso», ne tiom inspirita kiel la antaŭa, sed korekte sbribita de sinjoro Hector Vermuyten el Antwerpen, Belgica.

«Esperanto, la plej taŭga disvastigilo de Kristana Doktrino», fiksita temo de la premio X.

Tri verkoj alĝustigis al tiu ĉi temo, sed nur unu plene sukcesis altiri la atenton de la Jugantaro pro ĝia erudicio pritraktanta la socian signifon de la eklezia juro. La premiita verko estas devizita *Seriozeco* kaj numerita 91. Aŭtoro: Sro. Jacob Schmid, el Bern, Suissa.

Mencion meritas la verko nro. 113, devizita *Amu unu la alian*. Estas la aŭtoro de tiu ĉi manuskripto, Sro. Ramon Casas, el Manresa.

«Al la plej bela tradukita Poemo», fiksita temo de la premio XIX.

Multaj versaĵoj povis esti grupigitaj por tiu ĉi premio, sed la Jugantaro elektis kvin aŭ ses, kiuj montris originon de malfacila tradukebleco. El tiuj, fariĝis tiuj rimarkinda la verko nro. 3, devizita *Hesperis*, kiu estas traduko de la enkonduka parto de la konata kataluna poemo ATLANTIDO, malfacilega tamen plene sukcesinta laboro, kiun ni ŝuldas al la sperta plu-

mo de nia literaturamanta samideano, Sro. Ramon Prada, el Sant Justí de Vallbona.

Mencion meritas la verko nro. 32, devizita *Vienano*, kies enhavo estas traduko de la poemo «La Morto de Tiberio», laŭ la germana originalo de Emanuel Geibel, korekte esperantigita de Sro. Karl Jimel, el Vieno, Aŭstria.

«Verko priskribanta Katalunan Folkloran Temon», fiksita temo de la premio XXII.

Meritis la premion, pro ĝia pli korekta kaj ĝusta priskribo, la verko nro. 112, devizita «Vilaĝana moro». Aŭtoro: Sinjorino Dolors Bassols de Comella, el Vic.

Mencion oni aljuĝis al la verko nro. 111, devizita *L'ermito*. Estas aŭtoro de tiu ĉi manuskripto, Fraŭlino Montserrat Cincà, ankaŭ el Vic.

LIBERVOLAJ TEMOJ

II. Originalaj versaĵoj.

Tridek-unu versaj verkoj pledis por atingo de premioj en tiu ĉi grupo, sed apenaŭ la triono povis esti konsiderata kiel indaj aspirantoj, pro iliaj korekteco, sentofluco kaj originaleco en la versado, kvankam ĉiuj verkoj enhavis longajn kaj diversstemajn poemojn.

PREMIO XIV al la verko nro. 18, devizita *Mi mem*, tre kortuŝa soneta triptiko, kiu en profunda formo martelas kelkajn sentojn pri la vivo. Ĝia aŭtoro: Sro. Nikolajs Kurzens, el Riga, Letonia.

Mencio al la verko nro. 82, devizita *Verda gorgo*, du mallongaj sed delikatsentaj poemoj de nia juna batalanto, sinjoro Josep Garganta, el Barcelona.

PREMIO XI al la verko nro. 59, titolita *Al la Muziko*, kiu prikantas en bela esprimó la vivplenecon de la muziko. Estas aŭtoro de tiu bela poemo, Sro. Adalberto Berohn, el Bucaresti, Rumania.

III, Mencio al la verko nro. 5, titolita *Al Preterpasanto*, de nia konata flandra pioniro, Sro. Jan van Schoor, el Antwerpen, Belgica.

PREMIO XXI al la verko nro. 66, titolita *Laboristaj Sonetoj*, kvar sonetoj bele elfluantaj. Aŭtoro: M. Strümpfel, el Lösznitz, Saxonia.

Mencio al la verko nro. 56, devizita *Homo restas homo ec ne dezirante tion*. Aŭtoro: Sro. H. Sazonov, el Moskvo, Rússia.

PREMIO XVI al la verko nro. 26-29, devizita *Amanto-*

✓ *Sopiranto*, kolekto de 17 poemoj en libera poezio kaj imitantaj la francan skolon de Apollinaire. Aŭtoro de tiuj inspiritaj poemoj estas nia 17-jara samideanino Vera Gutmann, el Tallin, Estônia.

Menciojn meritis la verko nro. 65, de Sro. M. Strümpfel, el Lösznitz, Saxônia, kaj la verko nro. 7, kies aŭtoro estas la flandra samideanino Martha Vervloet, el Mortsel, Belgica.

Tradukitaj versaĵoj.

✓ PREMIO IX al la verko nro. 20, devizita *Kantareto por esperanto-instruo al infanoj*, dek-du konataj germanaj kantoj kun akompano de respektivaj melodioj. Ĉiuj lerte tradukitaj kaj kun bonaj rimoj, ellaboritaj de Sro. Martin Strümpfel, el Lösznitz, Alemana.

✓ PREMIO XXV al la verko nro. 25, devizita *Dunedin*, traduko de Edinburch after Flodden de la angla verkisto William Aytoun. Ok-silaba longa poemo rakontanta historian militan epizodon en Skotlando, lerte tradukitan de la sperta esperantistino Louise Briggs, el Leeds, Anglaterra.

Mencio al la verko nro. 30, devizita *Roslino*, du tradukoj de la anglaj aŭtoroj Sir Walter Scott kaj Charles Kingsley, de la sama tradukintino antaŭe citita, Louise Briggs.

PREMIO XXIX al la verko nro. 36, titolita «La Ĉina Fluto». Okdek-tri poemoj de ĉinaj poetoj de post la epoko 7-jarcenta antaŭ Kristo ĝis niaj tagoj, laŭ la kompilo de Hans Bethge. Tiu ĉi manuskripto konsistas el 132 paĝoj, enhavante ĉe la fino longan kaj tre interesan studon pri la ĉina liriko. Tiun ĉi kolosan laboron entreprenis nia laborema literaturamanto, Sro. Jan van Schoor, el Antwerpen, Belgica.

Mencio al la verko nro. 24, devizita *Batalo kaj amo*; kelkaj poemoj tradukitaj el la rusa kaj pola lingvoj. Aŭtoro: sinjoro W. Hryniewicz, el Stalino-Doŭbas, Rússia.

PREMIO XXVI al la verko nro. 79, devizita *Kun verda stelo kaj ruga koro*, ses tekstmotivoj por konataj melodioj de famaj germanaj komponistoj. Ni ŝuldas ilian tradukon al sinjoro Karl Vanselow, el Berlin, Alemana.

Mencio al la verko nro. 6, devizita *Aminto*. Traduko de la poemo «La Kiskomerco» de la germana aŭtoro Ernst Langbein. Ĝia tradukinto estas Sro. Jan van Schoor, el Antwerpen, Belgica.

PREMIO III al la verko nro. 31, titolita *Al Amatino*, de la fama greka lirikistino Sappho. Bela poemo kvar-strofa, kun tri versoj *safikaj* kaj unu *adonisiakaj*, vera perlo de la malnova

greka literaturo. Bone kaj arte sukcesis ĝia tradukinto, sinjoro Karl Jimel, el Vieno, Austria.

Mencio al la verko nro. 63, devizita *Labore et constantia*. Du poemoj de la flandra verkisto Guido Gazelle, tradukitaj de Sro. Hector Vermuyten, el Antwerpen, Belgica.

PREMIO XIII al la verko nro. 49, devizita «Antaŭen». Traduko de poemo de la nederlanda aŭtoro Hilarion Thans. Korekte tradukis Sro. Pol. van der Poel, el Mechelen, Holanda.

Originalaj prozaĵoj.

Tridek-kvar prozoj originale verkitaj konkursis al la sep premioj destinitaj por tiu ĉi grupo. Nur dek-du estis konsiderataj kiel bonaj, pro iliaj lingvo-korekteco kaj monstro de verkista talento. La restantaj konkursintaj verkoj estis interesaj, sed kvankam kelkaj montris verkistan kapablecon, mankis al ili la sufiĉa kono de Esperanto por flue interplekti la pensojn tra la argumento de la manuskriptoj. Tamen, ke ili ne restu senkuraĝaj por proksimaj konkursoj.

PREMIO XV al la verko nro. 107, devizita *Marysia*. Interesa manuskripto, 70 paĝojn amplesanta, kiu vere pruvas ke la aŭtoro posedas veran facilecon por entrepreni sukcese verkadon de longaj romanoj. La lingvo korekte priskribas per verkista lerteco travivitajn momentojn ĉe pola urbeto, kie la aŭtoro ŝajne estas la poŝtestro. La sukcesinta verkisto de tiu ĉi manuskripto estas Sro. Paul von Prabucki, el Miloslaw, Polònia.

Mencio al la verko nro. 54, titolita «En ĉambreto de deĵor-Oficiro» mallonga sceno pri la lasta Granda Milito. Ĝia aŭtoro estas Sro. E. K. Drezen, el Moskvo, Rússia.

PREMIO V al la verko nro. 12, titolita «En Labirinto de Amo». Tre longa rakonto skribita en formo tre originala, kiu vere montras harditan plumon de verkisto. Tiun bonstilan prozaĵon ni devas danki al la malnova pioniro Sro. Leo Belmont, el Varsovio, Polònia.

Mencio al la verko nro. 45, devizita «Glis», kiu priskribas viziton faritan al sveda vilaĝo post la Stockholma Kongreso. Aŭtoro: Miss Frances M. Bartholomew, el Letchworth, Anglaterra.

PREMIO XII al la verko nro. 35, titolita «La Leĝo de la Severeco». Sceno pri lukto inter aglo kaj vulpo tre detale priskribita de ĝia aŭtoro, Sro. Alois Hochreiner, el Frankenburg, Austria.

Mencio al la verko nro. 90, devizita «Pseŭdoscienco», kiu tre klare konkludas pri la laŭleĝa praktikado de Eŭtanazio kaj ĝiaj kontraŭjuraj konsekvencoj. Aŭtoro de tiu ĉi profunda studo estas Sro. Jacob Schmid, el Bern, Suïssa.

PREMIO IV al la verko nro. 80, devizita «Libera vivo», prozaĵo kiu bele rakontas en klara stilo terurajn momentojn de malsanulo en febra stato, kiu kondukas lin al simbola krimo. Aŭtoro de tiu ĉi originala priskribo estas Anna Galeazzi, el Varsovio, Polònia.

PREMIO VI al la verko nro. 74, devizita «Popola saĝo», kiu estas interesa studo pri la katalunaj popolkantoj kaj popoldancoj, skribita per senbalasta kaj flua lingvaĵo de ĝia aŭtoro, Sro. Ramon Prada, el Sant Justí de Vallbona.

PREMIO XVIII al la verko nro. 94, titolita «Pri la Maljuniĝo». Kelkaj pensoj, enblovitaj de trafa konsidero, pri la maljuniĝa epoko, esprimitaj per facila stilo de Sro. Jacob Schmid, el Bern, Suïssa.

Mencio al la verko nro. 93, devizita «Stranga», mallonga studo pri la rilatoj inter superstiĉo kaj scienco, de la sama antaŭe citata aŭtoro, Sro. Jacob Schmid.

PREMIO XXVII al la verko nro. 77, titolita «Patrinjo», verkita en flua kaj korekta lingvaĵo de nia konata verkistino Maria Elworthy-Posenaer, el Mariaburg-Eeckeren, Belĝica.

PREMIO VIII al la verko nro. 57, devizita «Justeco». Rakonto bele priskribanta scenon dum kristnaska nokto, dank'al la plumo de Sro. Henryk Gielb, Varsovio, Polònia.

Mencio al la verko nro. 92, devizita «Brava», kaj kiu estas biografio pri la kardinalo Eŭgeno Pacelli, lerte verkita de Sro. Jacob Schmid, el Bern, Suïssa.

Tradukitaj prozaĵoj.

PREMIO XX al la verko nro. 34, devizita «Pro flandria servanda». Tiu ĉi manuskripto estas plena traduko de tuta romano el la flandra lingvo, ampleksanta preskaŭ 200-paĝojn. La verko estas modela traduko de la romano Ernest Staas, advokato. Skizoj kaj Bildoj de la flandra aŭtoro Anton Bergmann, kaj entreprenis la kolosan laboron de ĝia tradukado, la senlaca flandra pioniro, Sro. Jan van Schoor, el Antwerpen, Belĝica.

Mencio al la verko nro. 37, devizita «Mili», kiu estas traduko de Toni Kytes, la Trompeganto de la angla aŭtoro Thomas Hardy. Ĝia tradukinto estas Louise Briggs, Leeds, Anglaterra.

PREMIO XXX al la verko nro. 109, devizita «Sezam mal-

fermiĝu». Simila verko kiel la antaŭe premiita, laŭ amplekso kaj enhavo, sed ĝi venas el la riĉa hungara literaturo kaj ĝia aŭtoro estas la konata Ludoviko Zilahy, kies plaĉa argumento kaj bela stilo estis senriproĉe interpretita de ĝia tradukinto, Sro. Ladislao Spierer, el Budapeŝt, Hongria.

PREMIO XVII al la verko nro. 11, devizita «Ankoraŭ unu fojon». Flua traduko de la franca verkisto Romain Rolland, kies kritika studo pri Wagner, okaze de Siegfried, estas transplantita en nian lingvon per majstra traduko de nia kataluna pioniro, Sro. Marian Solà i Montserrat, el Tarrassa.

PREMIO XXIV al la verko nro. 44, devizita «Top», kiu estas traduko de la nederlanda rakonto Bonsanco, kies aŭtoro estas Top Naeff. Amuza rakonto pri sceno en lernejo, lerte tradukita de Martha Vervloet, el Mortsel, Belgica.

PREMIO XXIII al la verko nro. 104, devizita «Fraksen». Traduko de La Murdo-Juĝado de la angla verkisto Charles Dickens. Supreflue estos diri ion ajn pri la enhavo de tiu ĉi manuskripto, ĉar la aŭtoro mem estas jam tutmonde konata. Flua traduko kiun ni ŝuldas al Sro. G. Badash, el Rotherham, Anglaterra.

PREMIO I al la verko nro. 71, devizita «Manresa». Longa kaj bonstila traduko el la kataluna lingvo, laŭ la originalo de J. Calzada, kaj kies tradukinto estas Sro. Jaume Herp, el Barcelona.

PREMIO XXVIII al la verko nro. 15, devizita «Reader of reade». Traduko de la rakonto Aventuro kun Ursino, de la angla aŭtoro Charles Reade. Bela kaj emociiga sceno dum ĉasado en arbaro, majstre tradukita de la klera esperantistino Louise Briggs el Leeds, Anglaterra.

PREMIO II al la verko nro. 61, devizita «Por», kiu enhavas tradukon de Dolĉa Morto de la kataluna verkisto Joan Puig i Ferrater. Senriproĉe kaj trafe tradukis tiun belan pecon, sinjoro Josep Alberich, el Barcelona.

Mencioj al la verkoj nro. 43, devizo «Fabelmondo pasinta». Kelkaj longaj tradukoj el diversaj germanaj aŭtoroj. Tradukis: Sro. Dro. Wolfgang Bichler, el Graz, Austria, nro. 85, devizo «Orfo kaj hundo». Traduko el la hispana lingvo. Aŭtoro de tiu ĉi traduko: Amalia Nuñez Dubús, el Pamplona (Hispanujo). Verko nro. 86, traduko el la rusa lingvo ellaborita de Sro. Serej S. Miĥajlov, el Leningrad, Rússia.

I ara per acabar, permeteu-me que digui uns mots en llengua catalana per a donar les gràcies a tots vosaltres per l'atenció i el respecte que heu mostrat en llegir-vos el meu raport

de Secretari d'aquests Jocs Florals Internacionals Esperantistes, que pel fet d'ésser escrit en Esperanto molts de vosaltres no haureu entès, però si haureu comprès l'esperit que els anima.

La Federació Esperantista Catalana ha establert el costum únic en el camp en què ella batalla, de celebrar en tots els seus Congressos nacionals aquest concurs literari saturat de la saba i de l'essència que ja posseixen el Jocs Florals catalans.

Però així com els Jocs Florals catalans abasten els literats que parlen i escriuen en la nostra llengua mil·lenària, els que acabem de celebrar reuneixen en les mateixes ànsies de superació molts homes separats mútuament per milers de quilòmetres, parlant diferents llengües i cultivant religions antagòniques.

Tots han rebut la merescuda distinció en aquesta festa, tots admiraran d'aquí unes setmanes la bellesa que eflueix de la Regina i senyoretas de la Cort d'Amor que la presideixen, tots retransmetran homenatge d'agraïment a aquesta ciutat, bella en situació, treballadora per antonomàcia i aimadora de la cultura per definició. Es també aquesta la ciutat que ens ha acollit amorosament, és la vostra ciutat, és Manresa. He dit.

EDUARD CAPDEVILA I BUIL

Parolado de la Prezidanto

Honorinda Reĝino,
Honorindaj Korteganinoj,
Sinjorinoj kaj Sinjoroj,

Ne mia estas la kulpo, se mi nun al vi parolas kaj okupas postenon de kie iu ajn el miaj samideanoj povus pli bone ol mi pliagrabligi vian ĉeeston al nia Festo de la Floraj Ludoj.

Preferinde estas, ke vi kulpigu nenium. Se tamen vi sentas la preman neceson trovi kulpulon, via kolero falu sur la kapon de tiuj, kiuj, ne singardemaj, alfrapigis mian hejmon kaj el ĝi min eltiris.

Ĉio aminda en la vivo estas ĉi tie reprezentita per la Reĝino, per kiu la premiita poeto volis premii nin. Ŝi kaj ŝia bela Kortego de Amo estas la beleco, la juneco, la optimismo, la sunradio kiu de trans nebuloj venas al ni rememorigi, ke Printempo refloras ĉiujare kaj donas al ni kurageton por iri la vojon ĝis la jaro sekvanta.

La Poetoj, kiuj el malproksimaj landoj respondis al la voko

de nia turniro, estas la internacia spirito, kiu ĉiam kun pli streĉitaj fortoj posedas la homan koron.

La aŭtoritataj moŝtoj, kiuj nin prezidas, estas niaj ordo kaj ordono libere elektitaj, kaj ili reprezentas, fine, en tiu ĉi momento kaj post jarcentoj de foresto, tiun nacian volon, sen kiu la vera internacia spirito ne estas ebla kaj sen kiu vane ni celus senti amon, belecon, junecon kaj optimismon. Kaj la lumon de nia suno.

Vi, vi estas la popolo, nia popolo, nia ĝardeno de floroj tiel diversaj — tio estas ĝia ĉarmo — kaj ĉiuj tiel belegaj.

Sed ne estas rozo sen dornoj, nek ĝardeno sen kardoj, nek ĝojo sen doloro, kaj por ke vi ne havu pri la vivo tro mildan ideon kaj por ke per kontrasto vi pli bone povu admiri ĝiajn belajn faĉetojn, mia rolo ĉi tie estas maldolĉigi vian ĉeeston per lego de parolado.

Tamen, mi ne trouzos mian devon ĉar, ofta ĉeestanto en kunvenoj kiel la nuna, mi ĉiam kalkuladis kun paniko la paĝojn, kiujn turnis tiuj sinjoroj, kiuj legas de postenoj kiel ĉi tiu kaj me ne volus, ke vi pensu pri mi tion, kion pri ili mi pensis.

Tial ke mi volas allogi vian indulgon, mi tuj diros, por komenci, ke nun mi rompas tradicion. Laŭ kutimo de niaj Floraj Ludoj, ĉio devas esti dirita en Esperanto kaj tio estas logika pro la plezuro, kiun ni sentas, kiam ni parolas la lingvon internacian kaj pro varbemo: tiun ĉi okazon ni proponas al publiko, kiu honoras niajn festojn per sia ĉeesto, kiel evidentan pruvon de la efiko de nia helpa lingvo.

La publiko, tamen, kiu en la komenco aŭskultas scivoleme, laciĝas tuj pro tio ke ĝi ne komprenas kion ĝi aŭdas. Mi antaŭtataŭigos tian laciĝon per tiu, kiun vi sentos pripensante pri tio, kion al vi mi diros katalune.

La fremdaj samideanoj, se ili kuraĝas, povos legi en niaj revuoj la esperantan tekston de tiu ĉi parolado. Vi ne tro multe gajnos per la ŝanĝo de laciĝo sed se vi ne konsentas kun mi, vi povos diri al mi la kialon.

* * *

En tiu ĉi Poezia festo mi volas fari al la Poetoj la honoron diri, ke ili estas la unuaj, kiuj sentis, komprenis kaj rekonis la voĉon de la vento, la kanton de la birdoj, la zumadon de la insektoj, la parfumon, kiu estas la voĉo de la floroj, la pezon de la korpoj, kiu estas la universala parolo de la mondoj senfine grandaj aŭ malgrandaj, de la planedaj sistemoj, kiuj, en la nemezurebla dezerto de la atomoj, turniras laŭ rapidecoj

senfine grandaj ĉirkaŭ senfine malgrandaj centroj de altireco.

Ili, la Poetoj, antaŭsentis, ke la ideo ne estas apanaĝo nur de homo. Kiu povus nei ĝin ĉe la abelo, la formiko, la birdo, ĉe arboj kaj mineraloj ne falante en la eraro interpreti la Universon laŭ antropomorfismo egoista kaj fiera?

Kiu povus nei, ke ĉio, kio ekzistas, enskribas sian ideon en Tempo kaj Spaco laŭ formo, kiu respondas al tio, kio, ĉe la homa estaĵo, estas la vorto, ponto kunliganta Materion kaj Spiriton, videbla kaj palpebla elmontro same de la Ideo kiel de la Parolo?

Ne eligu ni el la ensorcita reĝolando de la Poezio kaj ni akceptu tion kiel certa.

Mi volas nur nun diri, ke la triangulo, en kiu moviĝas ĉiaj homaj agoj, celoj kaj idealoj havas kiel pintojn la Ideon, la Vorton kaj la Parolon, kiuj estas la triunuo de nia mondo, laŭ tri malsamaj elmontroj kaj unu sola vera reprezento de la vivantaj kreitaĵoj.

Ili ne povas disiĝi sen detruigo. Ni ne povas koncepti unu sen la alia, escepte se ni foriras el la reala vivo kaj eniras en la relativecon de la imagaj mondoj.

Ni, homoj, tamen posedas plie kaj super la aliaj estaĵoj kaj kreitaĵoj, por nia bono aŭ por nia malbono, la dian aŭ demonan povon esti mastroj de niaj ideoj kaj de la iloj elmontri ilin.

Vento aŭdigas sian voĉon same hodiaŭ kiel antaŭ miloj da jarcentoj; trilas birdo kun sama ritmo je la irado de Tempo; la nestoj de formikoj kaj abeloj, la bufaj galerioj, identaj tra la jarcentoj, imperativaj, eksteraj je la fluo de iu ajn evolucio.

Ni admiru tamen la Homon, sinjoro kaj mastro de sia Ideo — spite ĉiuj tiranoj — kiel li evoluas, kiel ĝi perfektigas siajn sentojn, siajn organizaĵojn, kiel ĝi plialtigas kaj plilargigas sian indecon. Ni admiru ĝin, mastro kaj sinjoro de siaj esprimiloj, kiel ĝi uzas la artojn, superegas, perfektigas kaj studas ilin, kiel ĝi ordigas kaj analizas la Vorton kaj la Parolon — spite ĉiuj imperialismoj.


La homa Volo estas, kiu estras.

La homo de hodiaŭ ne pensas, ne sentas, ne parolas kiel la hieraŭa homo.

Se la Verbo kreis la mondon, la homo, hodiaŭ, kreas la Parolon, kiu kreas universojn. Al ĉiu el siaj eltrovoj ĝi kreas la precizan vorton. Al siaj novaj ideoj ĝi donas novan leksikonon.

Al la nova internacia sento li ofertas la internacian lingvon.




Kiam la scienculoj observadas bestojn, plantojn kaj mine-



Solena inaŭguro de la XVIII^a Esperanto-Kongreso ĉe la Urbodomo



La Manresaj aŭtoritatuloj inaŭguras la Esperantan Ekspozicion



Kelkaj grupoj de kongresanoj



Grupo de kongresanoj antaŭ la Kongresejo



Ekskurso al Cardona: vizito al la fama kastelo

Organiza Komitato

Vicprezidanto



Josefo Galmet

Kajisto



Modest Tuset

Uoedonanto



Maria Golla

Prezidanto



Antonio Muset

Uoedonanto



Josefo Coma

Sekretario



Jezuo Prat

Uoedonanto



Pere Saumell

ralojn kiel erojn de la Naturo, ili universaligas ilin per nomoj grekaj aŭ latinaj, internaciaj lingvoj de la senpatrolanda scienco.

Kiam en ia nacia lingvo ni parolas pri amo, pri patrino, pri beleco, pri tero kaj ĉielo, ni esprimas la ideon pri ĉielo, tero, beleco, amo kaj patrinoj de la lando, kies lingvon ni uzas.

Kiam ni parolas en internacia lingvo, pri la tuta tero, ĉielo, amo, kaj beleco, pri ĉiuj patrinoj en la mondo ni esprimas la ideon.

Jen kial ni volas, amas, miras kaj admiras la internacian lingvon, kiu ebligas al ni esprimi niajn ideojn kaj ilin subtreki per la universala sento, kiun pri la mondo ni havas — ; kiu ebligas al ni altigi nin, superflugi la landlimojn kaj elmontri nian panoraman vidon de la mondo.

Jen estas unu el niaj kialoj kaj pravigoj. Estas multaj aliaj pri kiuj mi silentas ĉar mi ne volas vin eltiri el tiu ĉi Poezia festo, kie la imago rajtas flugi senpeza kaj sen timo, kaj enkonduki vin en feston de la Utopio parolante al vi pri internaciaj amo kaj frateco.

El tio ankaŭ konsistas niaj revoj!

Ĉar, inter ni mi diros — sed ne disvastigu la konfidencion — ĉiujn fervorajn anojn kaj propagandistojn de la internacia lingvo doloras iom la virto kaj la malvirto revii.

FRED PUJULÀ

La prezidanto de la O. K. Sro. Muset, fermas la feston per kelkaj vortoj de danko al la multnombra publiko kaj subtrekas la altan signifon de Esperanto en la kulturo de la popoloj. La publiko aplaŭdas kun fervoro dum la Reĝino kaj ŝiaj korteganinoj forlasas la festoĉambron. La festo finiĝas kun granda entuziasmo kaj la publiko disiras komentariante la belecon de la festo kaj alte taksante la ĉarmon de la internacia lingvo, kiun por la unua fojo multaj aŭdis.

OFICIALA FESTENO

Sub la prezido de la dolĉa Reĝino kaj belaj korteganinoj, kiujn akompanis Sro. Fred. Pujulà, la poeto Sro. Jaume Grau Casas, la sekretario Sro. Eduard Capdevila kaj aliaj pioniroj, okazis en hotelo St. Domènec la oficiala festeno. Partoprenis ĉirkaŭ cent gekongresanoj kaj dum la festeno regis granda kamaradeco. Je la fino Sro. Pujulà eldiris belan paroladon pri sia multjara esperantista vivo, el kiu li citas kelkajn interesajn

anekdotojn kaj epizodojn, kiujn la ĉeestantoj aŭskultas kun plezuro. Sekvas paroladoj de Sroj. Cases Carbó, Grau, Dalmau, Capdevila kaj aliaj.

KONCERTO

Finiĝis la unua kongrestago per koncerto en Orfeó Manresa. Profesoroj Josep Duran, Marian Homs kaj Antoni Muset regalis nin per majstre luditaj komponaĵoj, kiujn oni premiis per varmaj aplaŭdoj.

DUA KONGRESTAGO 1-a de junio.

La dua kongrestago komenciĝis per kelkaj vizitoj al la plej interesaj lokoj de la kongresurbo. La plej multnombra grupo vizitis la artoplenan katedralon kaj la Sanktan Kavon. Niaj gastigantoj gvidis nin tra la plej rimarkindaj lokoj kaj priskribis la historion kaj valoron de la vizitataj monumentoj. La gekongesanoj admiris kun plezuro la artajn trezorojn, kiujn enhavas la antikva Manresa, kiu ludis tiel altan rolon en la historo de Katalunujo.

DUA LABORKUNSIDO

Sama loko, la 1-an de junio, je la 11-a h. kaj 30 m.

La honoran Prezidantecon okupas Sro. Fred. Pujulà. Prezidas Sro. Sebastià Alberic. Protokolas Sro. Rafael Gisbert. Partoprenas 115 gekongresanoj.

La sekretario legas kelkajn telegramojn kaj leterojn.

Sro. Fred. Pujulà legas la sciigon publikitan de «Full Official». Sro. Prezidanto de Katalunujo akceptis Honoran Prezidantecon de la Kongreso de H. E. A., kaj petas, ke oni protokolu la proteston. Laŭ propono de Sro. Fred. Pujulà unanime oni aprobas telegrafi al Sroj. Prezidanto kaj Konsilisto de Kulturo. Oni longe aplaŭdas la tekstojn de la telegramoj.

Laŭ propono de Sro. Rafael Gisbert, estas elektata Arta Direktoro de K. E. F. nia eminenta artisto Sro. Jacint Comella, kaj oni dediĉas al li, per longa aplaŭdado, la admiron de la gekongresanaro pro lia bela ekspozicio de akvareloj kaj oleaj pentraĵoj, plene sukcesinta.

Sro. Samuel Roca proponas telegrafi al la Urbestro de Barcelono pri la petskribo rilatanta al la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, kaj estas aprobita.

Sro. Samuel Roca parolas pri sia verko «Catalunya i la llengua internacional» («Katalunujo kaj la lingvo internacia»), konkursanta la premion «Prat de la Riba», kaj legas la antaŭparolon. Ankaŭ li parolas pri la eldono de la verko, kaj petas la patronadon de K. E. F. Oni aprobas komplezi, laŭeble, Sron. Roca.

Sro. Eduard Capdevila diras, ke ĝis nun ni okazigis 17 Internaciajn Florajn Ludojn, kaj, ke same kiel ni havas la belan «Katalunan Antologion», ni devus kolekti en libro ĉion rilatantan al tiu grava festo kaj la plej rimarkindajn verkojn premiitajn ĝis nun. Aldonas, ke tiu libro estus tre grava, kaj, ke por la plej granda sukceso de la projekto oni proponu la eldonon al A. E. L. A.

Parolas pri la afero Sroj. Comella, Roca, Gili kaj Gisbert. Sro. S. Alberic diras, ke la eldonisto povus esti tiu menciita de Budapest, sed, ke oni al ili povus proponi, ke la verko estu presata en Katalunujo, ĉar tiel la preskosto estus malpli alta. Esta aprobita.

Laŭ propono de Sro. Gisbert longan aplaŭdadon oni dediĉas al la Kongresa Komitato de Manresa pro ĝia laŭdinda agado.

Laŭ propono de Sro. Chaler, oni dediĉas unuminutan silenton al niaj mortintoj.

Oni aprobas daŭrigi la diskuton de proponoj ĉe la ferma kunsido.

Fermo je la 13-a.

LUNĈO

La organizantoj de la Lunĉo ne supozis, ke tiom multaj kongresanoj partoprenos ĝin kaj tial rezultis ke tiu parto de la programo ne disvolviĝis kontentige. Multaj partoprenantoj ne trovis sidlokon kaj estis devigataj ĉeesti kiel rigardantoj, dum la aliaj gaje ricevis siajn porciojn. Malgraŭ ĉio neniu protesto aŭdiĝis kaj la festo disvolviĝis kontentige.

FERMA KUNSIDO

En la Urbodomo. Posttagmeze, je la 16-a.

Sro. Fred. Pujulà okupas la Honoran Prezidantecon. Prezidas Sro. Sebastià Alberic. Protokolos Sro. Rafael Gisbert.

La sekretario legas telegramon ĵus ricevitan, kies tekston ni tradukas: «Ĝeneralitato de Katalunujo al Sroj. Fred. Pujulà»

là kaj Sebastia Alberic. Tial ke ne estas eble veturi al Manresa, bonvolu reprezenti min en la Kongreso kaj Floraj Ludoj. KREDU ke mi sentas grandan seniluziigon, ke mi ne povas kunlabori en viaj taskoj, kiuj havos tiel altan efikon en la rilatoj inter ĉiuj homoj kaj ĉiuj popoloj. Esprimante miajn bondezirojn por la triumfo de via idealo vin ĉirkaŭbrakas Ventura Gassol. La gekongresanoj per tondra aplaŭdo dankas la telegramon de la Konsilisto de Kulturo de nia registaro.

Sro. Peris proponas kiel Kongresurbon por 1937 Terrasana. Sro. Chaler, nome de la tieaj gesamideanoj, varme akceptas la sugeston, kaj promesas, ke la Kongreso atingos rimarkindan reliefon. La gekongresanoj aprobas la proponon. Sro. Gili rimarkigas, ke en 1937 Pentekosto estos en la tagoj 16 kaj 17 de majo, kaj ke la Kongreso okazos, do, en la tagoj 16, 17 kaj 18 de majo.

Sro. Jaume Grau anoncas sian projekton eldoni volumon kun 20-25 poemoj de Artur Doménec, kaj rekomendas al la Grupoj, ke ili pretigu sin fari mendojn. Li rememorigas la mirindaĵon, ke nia plorata Doménec, post 2-3 monatoj eklerni Esperanton, gajnis la naturan floron de la Internaciaj Floraj Ludoj.

Oni pritraktas la elekton de la nova Komitato. La gekongresanoj proponas tutan reelekton. Kelkaj komitatanoj ne povas akcepti tiun honoron. Estas unuanime elektita la jena Komitato: Prezidanto: Sebastia Alberic; Vic-Prezidanto: Joan Gili; Sekretario: Josep Garganta; Vic-Sekretario: Jacint Casademunt; Kasisto: Josep M. Coll; Kalkulisto: Josep Banet. Bibliotekisto: Eduard Capdevila; kaj Voĉdonantoj: Josep Albagés kaj Jaume Herp.

Sro. Samuel Roca, per bela parolado, liveras al la Honora Prezidanto petskribon por la Kataluna Registaro, pri subvencio kaj ĉia kunhelpo.

Sro. Fred. Pujulà, reprezentanto de la Konsilisto de Kulturo, prenas la petskribon, kaj faras belegan paroladon por fermi la Kongreson. Liaj ideoj fluas tiel bele tra liaj inspiritaj frazoj, ke entuziasma kaj longa aplaŭdado de la gekongresanoj montras ĉies admiron.

Post kelkaj paroloj de la Prezidanto, Sro. S. Alberic, la gekongresanoj ekeliras kun entuziasmo dezirante ĉeesti la proksiman Kongreson.

Fino je la 18-a.

LASTAJ EPIZODOJ DE LA DUA KONGRESTAGO

Posttagmeze oni daŭrigis la vizitojn al la plej belaj lokoj de la kongresurbo kun partopreno de multaj gekongresanoj, kiuj povis konstati, ke Manresa estas moderna urbo en kiu reliefigas la amo al la kulturo, al la laboro kaj al la arto.

Vespere, je la sepa, en placo de l'Om okazis la anoncita dancado de *sardanoj* per kiu «Foment de la Sardana» regalas la kongresanojn. Ankoraŭ multaj gekongresanoj dancis la katalunan nacian dancon. La Reĝino kaj korteganinoj de la Floraj Ludoj ankaŭ dancis kaj donis al tiu parto de nia programo sian ĉarmon kaj altiron.

Finiĝis la dua kongrestago per la projekcio de interesaj amatoraj filmoj en Centre Excursionista de la Comarca de Bages. La gekongresanoj plej multe ŝatis la filmon de nia samideano Jaume Herp, kiu prezentis tre dokumentitan raporton pri nia lasta Kongreso en Ripoll. La belaj scenoj de tiu neforgesebla Kongreso revivigis la tagojn travivitajn en Ripoll en la lasta jaro.

LASTA KONGRESTAGO

La ekskurso al Cardona altiris ne malpli ol 60 gekongresanojn. La vetero ne volis aliĝi al la ekskurso kaj ĝi trompis nin per ofta pluvo. Ne pro tio la ekskursantoj malkuraĝiĝis kaj la bonhumoro kaj gajeco konstante estis kun ni. En la Urbodomo de Cardona la urbestro kaj la sekretario akceptis nin kun plezuro kaj bonvenaj vortoj al kiuj respondis nia prezidanto kun danko kaj priskribo pri la tasko, kiun efektivigas la esperantistoj en la tuta mondo.

Post la akcepto oni vizitis la antikvan preĝejon de Cardona kaj la salminejon, tiel faman en la historio de Katalunujo.

La vetero ankoraŭ volis fuŝi la viziton. Sub la gvido de sinjoro Josep Guix ni vizitis la plej rimarkindajn lokojn kaj ni povis konstati la mirindan lertecon de la naturo.

En Hotelo Comerç okazis komuna tagmanĝo kaj ĉe ĝia fino elokvente parolis la prezidanto de la O. K. Sro. Muset, kiu dankis la kongresanojn kaj esprimis sian ĝojon, ke la Kongreso tiel bone sukcesis. Sro. Alberic en la nomo de ĉiuj gekongresanoj dankas la organizintojn de la Kongreso kaj precipe Sron. Muset kaj liajn plej proksimajn kunlaborintojn, kies longa laboro kaj entuziasmo ebligis la efektivigon de la nunjara festo. Sro. Jaume Grau legas improvizitan soneton en katalu-

na lingvo, kies versoj trafe respegulas la dolĉecon nia Reĝino.

Post la manĝo oni vizitis la ruinojn de la fama kastelo de Cardona kaj post tio la aŭtobusoj rekondukis nin al Manresa.

ĜIS TERRASSA

Nun la gekongresanoj disiras. Manpremado, adiaŭado kaj bondeziroj. La O. K. akceptas la lastajn dankesprimojn kaj promesas daŭrigi la laboradon por Esperanto por eltiri el la bela rezultato de la Kongreso la maksimuman profiton por nia afero. Adiaŭ, karaj manresanoj. Via gastamo kaj sincera amikeco longe restos en nia koro. Ni ankaŭ promesas konstante labori en niaj lokoj por la komuna idealo kaj ni esperas, ke en Terrassa ni revidos nin ĉiujn. Vivu Esperanto!

VERDAJ ĈEMIZOJ

En gazetoj ni legas, ke la svisa juĝistaro sekvestre retenis U. E. A. en Ĝenevo.

La perforto kaj ĉemizoj sukcesas en la mondo.

Sed pli ol armeoj, kanonoj kaj aviadiloj, eĉ super «barbaraj» popoloj (ĝenerale pli honestaj, pli humanaj kaj homaj ol la t. n. civilizitaj) — sukcesas la venengasaj bomboj.

* * *

La diktatorecoj kaj ĉemizoj heroas pro siaj kulturaj murdoj.

* * *

Ne estas mirinde, ke sub tia mondkultura influo ankaŭ ĉe ni ekfuncias verdaj legioj kaj verdaj ĉemizoj...

* * *

Pro la granda idealo por la homaro kaj paco la esperantistoj estas la plej nobla kaj la plej kultura popolo, eĉ pli ol la roma...

Kreiĝas do en mia menso jena genia penso:

Vekiĝu la verda armeo kaj en nobla gesto por kulturi kaj civilizi la mondon ĝiaj gvidantoj ekgvidu ĝin kontraŭ la bar-

bara mondo, kiu en sia mallumo ankoraŭ ne komprenis la grandan valoron de la esperanta kulturo...

* * *

Kaj mi jam vidas kun tremanta koro kaj radiantaj ĝojoj, kiel dum granda parado en Ĝenevo niaj ankoraŭ de Svisujo nesekvestritaj gvidantoj akceptos heroe sur la sojlo de sendeficita U. E. A. la defilantajn verdajn legiojn post ilia venko...

* * *

Sed kio okazus — vi povus demandi — se la svisa juĝistaro estus sekvestrinta la kulpajn gvidantojn pro la malbona kaj facilanima kontrolado de U. E. A. anstataŭ la restojn de ĝia kapitalo ? ! ...

S. GRENKAMP

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

LA LASTAJ OKAZINTAĴOJ

Esperantistoj sendube bone memoros, ke la voĉdonado de la delegitoj pri la ŝanĝo de la statuto kaj sekve la translokigo de la oficejo montris, ke 80 % el tiuj, kiuj voĉdonis, aprobis la ŝanĝon. Pro tio, ĉiu atendis baldaŭan solvon de la problemo kaj komencon de la vere necesa laboro de la centra oficejo.

Bedaŭrinde la svisaj protestintoj rifuzis akcepti la rezulton kaj ne ĉesigis la leĝan proceson, kiu malhelpas la translokigon kaj aldonas altajn kostojn al la jam suferanta budĝeto de nia organizo. Por pravigi tiun agon, ili prezentas ses kritikojn: — Oni sendis «aerpoŝte» bultenojn al kelkaj malproksimaj landoj; la cirkulero al la delegitoj estis subskribita de la Prezidanto, sed ne de la Direktoro, k. t. p. Sed la unua kritiko estis, ke la Prezidanto ne formale voĉdonigis la Komitaton pri okazigo de la delegita voĉdonado. Tio estas vera, ĉar ekzistis jam antaŭe voĉdono de la Komitato por translokigo al Londono. Neniu bonvola homo pretendos, ke estis necese revoĉdonigi ĝin kaj malŝpari ankoraŭ kelkajn monatojn kun la koncernaj altaj dispezoj por nur «formala» aprobo de la delegita voĉdonado pri aliigo de la statuto, kiu estas la sekvo de la aprobo jam donita. Kaj kion tia dua voĉdono de la komitato estus ŝanĝinta en la rezultato ?

Post la 4a de julio la Prezidanto traktis kun la protestintoj, kaj dum la unuaj tagoj de la Viena Kongreso ŝajne estis espero pri akordiĝo. Je la 14a de aŭgusto li ricevis leteron de Sinjoro Bouvier, kiu malaperigis tiun esperon kaj montris, ke la protestintoj estas decidintaj konduki la proceson ĝis la fino. Laŭ la kalkulo de la Komitato tiu certe daŭrus minimume sep monatojn, kaj, laŭ la advokato, eĉ pli ol unu jaron. U. E. A. ne plu posedas sufiĉe da mono por elteni dum tiom da tempo, ĉar intertempe ĝi povus preskaŭ nenion fari. La protestintoj per leĝa proceso malebligas la funkciadon en Londono, kaj ankaŭ malpermesas, ke la elektita Direktoro laboru en Ĝenevo, dirante ke li estis elektita nur por Londono. Fakte, do, tio signifas la morton de U. E. A. Pro tio, la komitatanoj en Vieno, kun granda bedaŭro, unuanime akceptis la ĉi-kunan rezolucion.

Post la kongreso la Prezidanto vizitis S-ron Bouvier, kiu promesis paroli kun siaj amikoj, kaj doni respondon je la fino de aŭgusto. La respondo alvenis, kaj denove montris, ke ili ne volas ĉesigi la proceson.

Tio montras, ke kelkaj malmultaj personoj tute ne volas akcepti la deziron de la granda plimulto, sed volas devigi la komitaton resti en Ĝenevo, kvankam ĝi bone scias, ke tio estas finance neebla. La komitatanoj, opiniante ke forta internacia organizo, kiu volas kaj povas labori en la intereso de la movado, estas pli grava ol iu nomo, decidis starigi novan organizon sub la nomo «Internacia Esperanto-Ligo». Ili atendas la subtenon de ĉiu Esperantisto, kiu deziras unuecon kaj bonan laboron.

(El «Esperanto Internacia».)

«NIA BATALADO», 100-paĝa ilustrita libro pri Litovujo kaj ĝia ĉefurbo Vilnius, estas senpage sendata al ĉiu petanto.
Skribu al: «Vilniui Vaduoti S ga, Kaunas, Litovujo».